

Pri la 10-a jubilea Mezorianta Kunveno en Kartvelujo kaj Armenujo: floru 200 floroj



La longe atendata kaj longege pretigita 10-a jubilea Mezorianta Kunveno finfine okazis en la antaŭviditaj tri partoj: antaŭkunvenaj ekskursoj tra Kartvelujo, prelegoj kaj AMO-seminario en Kutaiso kaj postkunvena restado en Armenujo kun Tago de la lernanto.



Entute partoprenis 50 homoj, ne ĉiuj en ĉiuj partoj. La plej 'fremdaj' nun estis paro el Kazak-lando kaj multaj rusoj, multe pli ol en pasintaj kunvenoj. Dum la ekskursoj oni vizitis la du ĉefajn vidindaĵojn en Kartvelujo, tio estas amaso da kristanaj preĝejoj, monaĥejoj, ermitejoj kaj la naskiĝloko de Stalin. Iusence Kristo kaj Stalin estas la du ĉefaj personoj en Kartvelujo.



La prelegoj, parte en la programo AMO (aktivula maturigo) de UEA, rilatis al Esperanto en tiu regiono Kaŭkazo kun aldono de Kazak-lando, Turkujo, Irano kaj Rusujo. Norda Kaŭkazo estis reprezentata de Abduraĥman Junusov el Dagestano. Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA, gvidis la FLAM-analizon de la movado. Ne demandu vin pri FLAM. Ĝi simple konsistas el la komencliteroj de Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Malavantaĝoj. Temas pri skemo, laŭ kiu oni povas analizi kiun ajn situacion, ankaŭ tiun de la Esperanto-movado.

Estis nur unu ĝenerala konkludo: venis la momento

por internacia kunlaborado inter la esperantistoj de la najbaraj landoj en tiu regiono: Kartvelujo, Armenujo, Turkujo kaj Irano. Oni forgesu la miljarajn kaj lastatempajn barojn kaj kuraĝe interŝanĝu vizitojn, ankaŭ laŭeble kun Azerbajĝano, partoprenu la aranĝojn organizitaj de esperantistoj en tiuj landoj, asertu sian ekziston kiel regiona movado.

Tute apartan pritrakton bezonus la staton de la armena movado. Ni renkontis la erevanajn esperantistojn, kaj Anna Lowentein komentis, ke ilia grupo estas multe pli forta ol la Esperanto-grupo en Londono. Tio montras, ke en Erevano malgraŭ ĉiuj problemoj la Esperanto-agado estas vigla ankaŭ kompare kun okcidenteŭropaj landoj. Pri tio ni povis plene konvinkiĝi dum la ekskurso kaj la prelegoj de la 'Tago de lernanto'.



Esperable ni sukcesos altiri la atenton de esperantistoj al ĉi tiuj landoj kaj la ties aranĝoj.

Mia persona konkludo estas, ke devas flori 200 floroj, alivorte ke en ĉiuj landoj de la mondo (proksimume 200) devos esti bona nombro da parolantoj de Esperanto. Sen tio en Roterdamo oni povas daŭre bati sian kapon kontraŭ la muro pri la falo de la membronombro, sed neniu solvo aperos. Esence oni devas reorienti sian atenton al la tuta mondo kaj se en Irano la agado estas pli promesoplena ol en Nederlando oni devas doni atenton al ĝi. Oni ankaŭ devas laŭcele orienti sian agadon al pliigo de la parolantoj en landoj sen parolantoj de Esperanto. La tuta Centra Azio, ekzemple, bezonas tian agadon. Kiel mi deklaris en la kunveno Centra Azio estas teritorio forlasita de Dio kaj de Marks kaj atentata nur de Usono kadre de ĝia 'milito' al Rusujo.

lom povas helpi la nove enretigita kurso en la rusa

<http://www.gazetaro.org/mamutido>, kiu estas proponata al ĉiuj rusparolantaj centrazianoj. Male ol



tio, kion asertas la Fundamento, rusoj ne loĝas nur en Rusujo sed multaj el ili loĝas en Centra Azio.

Laŭ la nunaj antaŭvidoj la estonta Mezorianta Kunveno devus okazi en Maroko.

Renato Corsetti
Kunordiganto de MONA

Kaŭkaza flamo lumigita

(1/4/2017)

Ardas la etoso en la jubilea deka Mezorianta Kunveno (MK) en Kutaisi, la dua plej granda urbo en Kartvelio. Tie en iom izolita urboranda kongresejo apud bela parko ariĝis modesta kvanto da esperantistoj el mirinda gamo da landoj, ĉiu kun deziro ricevi atenton kaj fortigi la movadon en ĉi tiu mondparto, konata en UEA laŭ la mallongigo MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko).



Antaŭ deko da horoj la aranĝon malfermis per bonvenigaj vortoj de la enlanda organizanto Nana Ĥizambareli; sekvis la saluto de la vic-prezidanto de UEA, kiu rakontis pri la kontinentaj kongresoj, kiujn UEA iel nun reformas al strukturo kiu pli facile enprenus la serion de Mezoriantaj Kunvenoj. La sekva saluto venis de Renato Corsetti, iama prezidanto de UEA kaj nuna ĉefa prizorganto de la regiono MONA. Kvara alparolo venis de Murat Özdizdar el Turkio, kiu partoprenis la MK-ojn de la komenco, kaj devove alvenigis junajn studentojn. Kaj la publiko: tridekkvino da homoj el Belgio, Britio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Japanio, Kartvelio, Kazaĥio, Rusio (inkluzive de la respubliko de Dagestano), kaj Turkio – kaj espereble Nederlando. Raportisto de loka ĵurnalo intervjuis kelkajn personojn.

Antaŭ naŭo da horoj estis malfermita la 31a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) per rapida klarigo de ĝiaj celoj, ekzistokialoj, kaj partoprenigaj labormetodoj. Tion la kunvenintoj rapide poste povis tuj sperti, per plenumo de FLAM-analizo. Paralele kun tiu seminario

- 10-a MONA Kunveno

funkciis kurso por komencantoj sub gvido de Anna Lowenstein, kiu arigis dekon da lernantoj.



Do, restis 24 personoj por la komenca sesio de AMO. Post klarigo pri la principoj de FLAM-analizo, Renato Corsetti donis tre valoran resumon pri la stato de Esperanto en landoj de la regiono sub diskuto, ekzemple en Tunizio, Alĝerio, Maroko, Jemeno, Emiratoj, Jordanio, Sirio, Libano, Irano kaj landoj kun pli forta organiza stato kiel Israelo kaj Turkio. Inter la landoj sen konataj esperantistoj li menciis (nesurprize) Sudanon kaj Libion. Laŭ tiu superrigardo la homoj eniris kvar grupojn. Unu listigis la fortojn de la esperantistaro, dua la lamaĵojn aŭ malfortojn. La tria kaj kvara grupo devis listigi la pli vastajn sociajn, politikajn kaj ekonomiajn faktorojn, kiuj por la disvastigo de Esperanto estos Avantaĝaj kaj kontraste Minacaj. La rezultojn vi legas sekvapaĝe kune kun bildoj de la seminarianoj diskutantaj.



La programo de la 10a MK kaj la AMO-seminario pluiros en la naskiĝinta tago, kun densa programo de prelegoj kaj prezentaĵoj. Fine de sabato okazos la dua parto de la FLAM-analizo, en kiu oni tiros konkludojn el la farita analizo kaj proponos konstruajn solvojn laŭ la principaro EKEK, kiun ni klarigos en la sekva komuniko. Sesio en la lasta seminaria tago dediĉiĝos

al kompilo de rekomendoj kaj planoj por konkretigi la konstatojn de la nuna kunveno.

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA

FLAM-analizo: la sesa

- 10-a MONA Kunveno

(1/4/2017)

Temo de la analizo: Progresigo de Esperanto en la seminaria regionomona4



FORTOJ

- Solvo en multlingva regiono.
- Lingvo sen poseda lando.
- Firmigilo por translimaj mondperceptoj.
- Turismo – solvoj per Esperanto.
- Komerca agado per Esperanto.
- Tutmonda E-komunumo.
- Lernfaciliga efiko.
- Pontolingvo kultura.
- Rekonata kiel literatura lingvo.

LAMAĴOJ

- Malfacilecoj renkontiĝi kaj kontaktiĝi.
- Manko aŭ modifegoj de E-historio en la regiono.
- Malabundo de bonaj informiloj, retejoj ktp.
- Lingva diverseco – multaj lingvoj servendaj.
- Limigitaj tradukoj el la regiono.
- Nemultaj aŭ nekonataj kulturaj produktoj.
- Malfacilecoj konigi la E-kulturon.
- Malmulteco de kapablaj gvidantoj.
- Plia emo eniri la komunumon ol en la movadon.

AVANTAĜOJ

- Granda evoluo de la reto – demokratigo de komunikado.
- Aliancoj estas la agantoj por lingvaj rajtoj – simildeanoj.
- Mildigo de vojaĝkostoj por alirirenkontiĝojn.
- Lingvo-lernemo – propedeŭtika valoro.
- Bezono por logika kaj problemsolva pensado.
- Sopiros pli kontentiga turismo.
- Senperforta lingva disvastigo.

MINACOJ

- Militoj, diktaturaj regantoj.
- Politikaj malpacoj inter landoj vojaĝlimigoj.
- Bremsado de komunikebloj.
- Nefortaj ekonomiaj cirkonstancoj.
- Ne-egalrajteco por virinoj en kelkaj landoj.
- Misinfluo de grandaj lingvoj.
- Neapliko de modernaj rimedoj.
- Antaŭjuĝoj pri Esperanto.

EKO 5 AMO 31
Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA

EKEK – ideoj naskiĝis el la FLAM'

- 10-a MONA Kunveno

(3/4/2017)

Kun kvardeko da partoprenantoj la 10a Mezorianta Kunveno proksimiĝas al la fino. Fine de la dua tago, la partoprenantoj de la 31a Seminario pri AMO revizitis la rezultojn de la antaŭtaga FLAM-analizo por diskuti solvojn aŭ tiri konkludojn. Jen la rezultoj de tiu sesio. EKEK: Evoluigi la fortojn, Kuraci la Lamaĵojn, Ekspluati la Avantaĝojn, Kontraŭi la Minacojn.

EVOLUIGI la FORTOJN

FORTOJ

- Solvo en multlingva regiono.
- Lingvo sen poseda lando.
- Firmigilo por translimaj mondperceptoj.
- Turismo – solvoj per Esperanto.
- Komerca agado per Esperanto.
- Tutmonda E-komunumo.
- Lernfaciliga efiko.
- Pontolingvo kultura.
- Rekonata kiel literatura lingvo.

Organizi lingvajn festivalojn: Tio emfazas la egalrajtecon de diversaj lingvoj, kaj lokas Esperanton inter tiuj valorindaj lingvoj. Ĝi altigas la konscion pri komunikaj defioj en multlingva mondo.

Eluzi la potencialon de Esperanto en turismo:

Depost la fermo de la centro de Bydgoszcz, ioma vakuo restas, indas reaktivigi la asocion Monda Turismo aŭ starigi novan. Gravus malfermi centrojn aŭ agantojn en turisme allogaj areoj, kiuj proponas servojn ne nur al esperantistoj.

Evoluigi la uzon de Esperanto en la Komerco:

Gravus kunlaborado kun IKEF, kaj pretigi datumbazon de funkciaj aŭ naskiĝantaj projektoj; Necesas rezisti la argumenton, ke esperantistoj kiel idealistoj, ne miksu sin en komencaj agadoj. Klare, unu el la kampoj por komenco estas turismo, alia estas livero de klerigaj servoj.

Konigu la pontlingvan rolon de Esperanto en literaturo:

Sukcesis kelkloke la uzo de Esperantaj tradukoj el malpli konataj lingvoj, por permesi plutradukon al aliregionaj malpli konataj lingvoj. Tiel sukcesas kultur-transmigroj, kiuj ne okazis pere de la grandlingvoj. Necesas pli forte konigi tiujn projektojn, krome dokumenti la organizadon malantaŭ ili, por kuraĝigi aliaj

LAMAĴOJ

- Malfacilecoj renkontiĝi kaj kontaktiĝi.
- Manko/modifoj de E-historio en la regiono.
- Malabundo de bonaj informiloj, retejoj ktp.
- Lingva diverseco – pluraj lingvoj servendaj.
- Limigitaj tradukoj el la regiono.
- Nemultaj aŭ nekonataj kulturaj produktoj.
- Malfacilecoj konigi la E-kulturon.
- Malmulteco de kapablaj gvidantoj.

KURACI la LAMAĴOJN

Pli efike mobilizi niajn hom(mal)fortojn: Potenca bremsilo al nia progreso estas niaj modestaj laborfortoj. Pli efika organizado kaj kunordigo eluzus la fortojn, kiuj ekzistas: por traduki, por verki, kaj literature kaj lingvoprezente. Gravus profundigo de la kapablo organizi allogajn eventojn (temo por iama AMO-seminario).

E-centroj kaj renkontiĝejoj: La modelo de Ecentroj

de la 80aj jaroj de la antaŭa jarcento jam ne prosperas. Kreendas nova modelo por E-centroj, ekonomie vivipovaj, kiuj proponas servojn ne nur al la esperantista komunumo, sed pli vaste. Gravus, ke estoj sciu, kie kaj kiam ili povos aliri esperantan etoson.

Konigo de aranĝoj: Ĝis nun la plej ampleksa kalendaro de eventoj estas ĝuste ĉe Eventoj.hu. Ĝi akceptas ĉion, kiun oni orde raportas. Nun ĉe UEA la revuo Esperanto ekhavas retejon, kiu povos same prezenti kalendaron pli ampleksan ol tiu en la presita revuo. Ĉiukaze, la esperantistoj atendas trovi multe pli frue informojn pri la gravaj eventoj – nelaste pri UK. Kalendaroj kaj simile devas ne nur konigi datojn kaj urbojn, sed kiujn unikaĵojn kaj specifaĵojn proponas difinitaj aranĝoj. La reto permesas aliri tiujn informojn, sed la event-organizantoj devas ilin bontempe fiksi kaj diskonigi. Esenco de komunikarto estas koni la bezonojn de la inform-ricivantoj – necesas demandi: kiam ili faras siajn decidojn pri partopreno en aranĝoj, kiuj estas la informoj, kiujn ili bezonas, kaj ĝis kiam, por fari konvenajn decidojn.

Vastigi la eblojn uzi la lingvon praktike: Kreskas niaj ebloj kaj atingoj pri informado kaj instruado, sed daŭre malfortas nia kapablo proponi konkretajn uzojn de la lingvo. Tiuj uzebloj alios por Esperanto ol por aliaj 'grand'lingvoj; ni devas pli klare difini kaj kreskigi ilin.

AVANTAĴOJ

- Granda evoluo de la reto – demokratigo de komunikado.
- Aliancoj estas la agantoj por lingvaj rajtoj – similideanoj.
- Mildigo de vojaĝkostoj por aliri renkontiĝojn.
- Lingvo-lernemo – propedeŭtika valoro.
- Bezono por logika kaj problemsolva pensado.
- Sopiros je pli kontentiga turismo.
- Senperforta lingva disvastigo.

EKSPLUATI la AVANTAĴOJN

Intensigi la uzadon de retaj ebloj: Unuaflanke por liveri pli bonajn servojn al esperantistoj, inkluzive de la filmado de eroj el Universalaj Kongresoj kaj aliaj gravaj eventoj, por ke homoj ne povantaj fizike ĉeesti

povu gustumi la enhavon. Sed aliflanke, vastigi la videblon de Eo por pli sistema informado en aliaj lingvoj, eventuale en kunteksto de pli vastaj celoj – daŭripovo, komunika justeco ks.

Malplialtiĝantaj vojaĝkostoj: Vastigi la eblojn por organizitaj prelegvojaĝoj, kiel delonge funkcias bone en Francio. Esperantistoj eluzu siajn konojn por proponi allogajn vojaĝservojn kaj praktikajn konsilojn por memvojaĝantoj.

Lingvaj Kunpuŝiĝoj: Esperanto povus ludi mildigan rolon, sed ne se ĝi aliancigas sin kun unu flanko de la kunpuŝiĝo. Necesas ĉiam senpartie interveni.

Propedeŭtika valoro: Konsideru tion pli ol nur lernfaciligilo, sed kiel humaneca kontribuo, por evoluigi la kapablon pli bone lerni pensi.

rekte; provindas aliĝi la pac-movadoj aŭ partopreni en pac-studoj.

Vojaĝmalebligoj: En la regiono vizito al unu lando povos malfaciligi aŭ malebligi eniron en alian landon. Foje eblos renkontiĝi en apudaj sed “neŭtralaj” lokoj.

Komuniklimigoj: Tiuj povas ekzisti, sed troveblas ‘etaj pordoj’; konsiloj pri alternativaj komunikkanaloj devus esti troveblaj.

Fondusoj kaj subtenaj projektoj: La enmovadaj ebloj estas modestaj, sed ekzistas programoj por ebligi partoprenon de indaj aktivuloj en UK, en kongresoj de ILEI, TEJO kaj aliaj. Limigitaj sumoj ekzistas por regiona evoluigo; nur bone prezentitaj buĝethavaj projektoj havas ŝancojn. Ekstermovadaj subtenoj estas ĉiam esplorindaj.

Seksa diskriminacio: En la koncernaj landoj eble organizindas kunvenoj nur por virinoj, kie eblos konigi la E-komunumon.

Antaŭjuĝoj: Tiuj povas varii laŭ regionoj kaj tra la tempoj. Iuj antaŭjuĝoj eksmodiĝis kaj jam ne bezonas reagojn, sed novaj antaŭjuĝoj povas naskiĝi – gravas frue rekoni ilin.

Difini pli klare la valorojn de Esperanto: Tiu punkto jam listiĝis sub ‘Lamaĵoj’ sed ripetindas: ni devas ellabori strategiojn pli klare prezenti ilin al kursanoj kaj interesatoj.



KONTRAŬI la MINACOJN

EKO 6 EKEK
Stefan MacGill
 Vicprezidanto de UEA

Militoj, diktaturaj regantoj: Malfacilas multon fari

Beynəlxalq Esperanto Dili – Universala Esperanto Lingvo - Azerbajĝano (21/4/2017)



Aperis elektronika forma libro de gramatiko pri Esperanto en azerbajĝana lingvo

(Azerbaycanca)

Faylı yükləmək üçün aşağıdakı keçidin və ya soldakı şəklın üzərinə basın və daha sonra açılacaq pəncərədə boz düyməni basın.

(Esperanto)

Por elŝuti la dosieron bonvolu klaki sur la ligilon suben aŭ sur la bildon maldekstren kaj poste en la malfermita paĝo klaki sur la grizan butonon.

Beynəlxalq Esperanto Dilinin Müxtəsər Qrammatikası

(18/4/2017)



Jen la invito al la irana kongreso sendita de Keyhan Sayadpour. Estas grave akcepti ĝin. Esperanto havos gravecon, kiam bona nombro da parolantoj troviĝos en ĉiuj landoj de la mondo. Irano estas lando kun bona movado sed iom izolita de la mondo. Via vojaĝo tien kontribuos al solvo de tiu situacio.

Renato Corsetti
Kunordiganto de MONA

La invitilo en pdf formo troviĝas en la reto kaj estas libere elŝutebla. Por elŝuti ĝin bonvolu klaki sur la ligilon suben kaj poste en la malfermita paĝo klaki sur la grizan butonon:

[https://mega.nz/#!4QwBQS4R!
WBbaY3ZunniWc9QZtJvw03IUqExG1pOFrexh2Q2ArZU](https://mega.nz/#!4QwBQS4R!WBbaY3ZunniWc9QZtJvw03IUqExG1pOFrexh2Q2ArZU)

– La lingvo Esperanto

لغة الاسبرانتو

(16/4/2017)



Aperis informilo por Esperanto en la araba lingvo preparita per la MONA Komisiono.

(Esperanto)

Por elŝuti la dosieron bonvolu klaki sur la ligilon suben aŭ sur la bildon maldekstren kaj poste en la malfermita paĝo klaki sur la grizan butonon.

(araba – العربية)

لتحميل الملف الرجاء الضغط على الرابط أدناه أو على الصورة في اليسار وعند ظهور الصفحة الضغط على الزر الرمادي

[https://mega.nz/#!4A5CTA7A!
QzPVq5zYWW4GB8MvPZRCqe7Pf_lfmwiDr-kg6ro8-_U](https://mega.nz/#!4A5CTA7A!QzPVq5zYWW4GB8MvPZRCqe7Pf_lfmwiDr-kg6ro8-_U)

Raporto pri aktivado en 2016 – 2016 yılı faaliyetleri raporu

– Turkujo

(23/4/2017)

(Esperanto)



2016 estis bona jaro por la turka esperantistaro. Jen kio realiĝis:

- Tri lernejoj estis organizitaj inter oktobro 2015 kaj majo 2016 (unu en la lernejo Üsküdar Amerikan en Istanbul, unu en la universitato Celal Bayar en Manisa, kaj unu alia kurso por interesiĝantoj en Istanbul)
- Efektive ekde la komenco de 2016 ekfunkciis la

Foto: la 9-a MONA Kunveno en Ürgüp Turkujo

nova retejo por la turka esperantistaro: <https://esperantoturkiye.wordpress.com>

- En januaro ekaperis la unua numero de la nova monata kaj senpaga revueto “Turka Stelo”: <https://esperantoturkiye.wordpress.com/2015/12/27/turka-stelo-1-2016-01/>
- En la fino de marto, en Ürgüp Kapadokio, okazis la sukcesa internacia 9-a MONA Kunveno, en kiu partoprenis nur 28 homoj pro la politikaj situacioj.
- En junio ekaperis la turka versio de Zagreba lemilo en la reto: <https://learn.esperanto.com/tr/>
- En julio 3 turkoj partoprenis en la 101-a UK en Nitra Slovakio. Kvankam en ĝi aliĝis 5 homoj, du el ili ne povis partopreni pro la politikaj situacioj.
- En novembro ekaperis la unua kontribuo de Turkujo en Esperantujo, la du lingva libro “Nazim Hikmet Poezia Antologio”
- En decembro okazis renkontiĝo de eta esperantista grupo okaze de la Z-Tago / Libro Tago

(Türkçe – turka)

2016 yılı Türk esperantistleri açısından iyi bir yıl idi. İşte gerçekleşen faaliyetler:

– Ekim 2015 te başlayıp, Mayıs 2016'ya kadar devam eden üç kurs organize edildi (biri Üsküdar Amerikan

lisesinde, biri Celal Bayar Üniversitesinde, biri de Esperontaya ilgi duyanlar için okul dışında)

- Efectif olarak 2016 başından itibaren Türk esperantistlerinin yeni web sayfası devreye girdi: <https://esperantoturkiye.wordpress.com>
- Ocak ayından aylık, ücretsiz dergi “Turka Stelo”nun ilk sayısı yayınlandı: <https://esperantoturkiye.wordpress.com/2015/12/27/turka-stelo-1-2016-01/>
- Mart ayı sonunda Ürgüp Kapadokya'da başarılı geçen uluslararası 9. MONA Buluşması gerçekleşti, ancak politik durumlardan dolayı buluşmaya sadece 28 kişi katıldı.
- Haziran ayında Zagrep Metodu adlı Esperanto eğitim sayfasının Türkçe sürümü devreye girdi: <https://learn.esperanto.com/tr/>
- Temmuz ayında, Nitra Slovakya'da gerçekleşen 101. Uluslararası Esperanto Kongresine 3 kişi katıldı. Kongreye 5 kişi kayıt olmasına rağmen iki kişi politik durumlardan dolayı Kongreye katılmadı.
- Kasım ayında Türkiye'nin Esperanto dünyasına ilk kitap katkısı olan Esperanto-Türkçe dilinde “Nazim Hikmet Şiir Antolojisi” piyasaya çıktı.
- Aralık ayında Zamenhof Günü/ Esperanto Kitap Günü dolayısıyla ile küçük bir Esperantist grup bir araya geldi.

لغة الإسبرانتو - La lingvo Esperanto
- Sirio

(27/4/2017)

(العربية – araba)

مقال من موقع سوري يتحدث عن الإسبرانتو وزامنهوف في تسع نقاط مع الأنفوغرافيك للقراءة، اضغط على الرابط التالي

(Esperanto)

Jen artikolo de Siria retejo kiu temas pri Zamenhof kaj Esperanto en naŭ infografikaj punktoj. Por legi klaki sur la ligilo sube.

<https://www.syr-res.com/article/13083.html>

(29/4/2017)

(Esperanto)

20150500 Cu vi parolas Esperanton Karaj geamikoj, Ĉi-monate okazis la Zamenhofa datreveno. Dum aprilo aperis en Israelo pluraj artikoloj kaj intervuo en la amasmedio. Nun, fine de la monato, estas bona okazo ilin resumi.



1. Bonefa longa artikolo pri Zamenhof, de Itai Nevo el Inst. Davidson, aperis en YNET, la plej vasta novaĵportalo en israelo

<http://www.ynet.co.il/articles/0,7340,L-4949186,00.html>

2. Intervjuo kun A.Wandel en la populara radio programo de Gabi Gazit (9:30min),

<http://103fm.maariv.co.il/programs/media.aspx?ZrqvnVq=GMGEGE&c41t4nzVQ=EE>

3. Intervjuo kun J.Tilleman en la radio Galej Cahal (6:30 min)

<https://soundcloud.com/gg0uqzpw2djd/intervjuo-kun-jehosua>

4. Artikolo en la tagĵurnalo Haaretz, la tria plej vaste legata en Israelo

<http://www.haaretz.co.il/magazine/obit/1.4037755>

5. Persona afiŝo en la oficiala paĝo de Prof. Ruth Gabison, unu el la plej gravaj juraj kaj homrajtaj personecoj en Israelo,

<https://www.facebook.com/ruthgavison/posts/1516919321711805>

Tiurilate, vidu la Gazetaran Komunikon de UEA:

<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2017/La-vivoverko-de-Zamenhof-dauxre-inspiras-100-jarojn-post-lia-morto>

Amike,

Amri Wandel

Prezidanto de ELI

(hebrea – עברית)

שלום חברים,

החודש מלאו 100 שנים לפטירתו של זמנהוף, וזו העת לסכם את הפרסומים והראיונות שהופיעו בתקשורת בישראל לציון התאריך:

1. מאמר מציון מאת איתי נבו ממכון דוידסון ב. 1.

<http://www.ynet.co.il/articles/0,7340,L-4949186,00.html>

2. ראיון עם עמרי בתכניתו של גבי גזית (9:30min),

<http://103fm.maariv.co.il/programs/media.aspx?ZrqvnVq=GMGEGE&c41t4nzVQ=EE>

3. ראיון עם יהושע בגלי צה"ל (6:30 min)

<https://soundcloud.com/gg0uqzpw2djd/intervjuo-kun-jehosua>

4. מאמר ב"הארץ" (לציון פטירת טדי לבנקופף אך רובו ככולו עוסק באספרנטו)

<http://www.haaretz.co.il/magazine/obit/1.4037755>

5. פוסט אישי בעמוד הפייסבוק הרשמי של פרופ' רות גביזון.

<https://www.facebook.com/ruthgavison/posts/1516919321711805>

כיון שהפוסט מאוד יפה ומציין גם את אחד מחבריני (משה בן פורת) אני מצרף אותו בהמשך, לטובת החברים שאינם בפייסבוק.

בברכת חברים,
עמר

Ruth Gavison – רות גביזון

Yesterday at 6:09am

עונג שבת: החודש מלאו מאה שנה לפטירתו של אליעזר לודוויג זמנהוף (1859-1917) ממציא האספרנטו

לחיינו ולמפעלו ראו, למשל, כאן: <https://he.wikipedia.org/...>

<https://mymotherstongue.wordpress.com/.../>

לזמנהוף, יהודי, שהיה בקיא בכמה וכמה שפות "יהודיות", היה חלום: הוא רצה שלכל אדם בעולם תהיה שפה שנייה, נוסף לשפת האם שלו, שבה יוכל לתקשר בין שפות ותרבויות. לכן הוא בנה שפה פשוטה, בעלת שורשים מעטים וכללים פשוטים וללא יוצאים מן הכלל, שיכלה להוות בסיס מסוג כזה ל"שפה עולמית". בעולם יש היום אקדמיה לאספרנטו ולמעלה ממיליון וחצי דוברים בארצות שונות. זמנהוף זכה להערכה רבה בארצות רבות, כולל אצלנו. בלא מעט ערים תמצאו רחוב זמנהוף. יש בולים לזכרו (אצלנו ב 2006) ויש גם יום אספרנטו עולמי

אומרים שיש ללימוד השפה הזו, שהוא קל יחסית, הרבה יתרונות – חוץ מיכולת תקשורת בינלאומית. למשל, בניסוי שעשו התברר כי קבוצת מבחן שלמדה שנה אספרנטו ואחר כך שלוש שנים צרפתית הגיעה להישגים טובים יותר בצרפתית מקבוצה אחרת שלמדה צרפתית ארבע שנים

יפה, לא? לא ממש הצליח ככלי להשכנת שלום והבנה בין אנשים. אבל איזה חזון ענק!

אני התחלתי פעם ללמוד אספרנטו לפני שנים כאשר ידיד קרוב, משה בן פורת, הפך דובר נלהב. ועכשיו, אחרי שנים, החלטתי לחזור ללימוד. יש הכל ברשת. מין אתר פלאי כזה ששמו! דואולינגו. נחמד

(28/5/2017)

Israela Kongreso 2017-2019, E-budo en Jerusalemo kaj la Tel Aviva klubo / קונגרס האספרנטו הישראלי 2017-2019, דוכן אספרנטו ביריד הספרים בירושלים והמועדון בתל אביב

semajno al chiuj membroj en Israelo kaj hodiaŭ al la eksterlandaj abonantoj. Membroj kiuj ne ricevis, kaj abonantoj kiuj ne baldau ricevos, bv. informi nin.

Kaj fine, tri alvokojn por niaj proksimaj agadoj:

1. Ni bezonas volontulojn por deĵori, en la Esperanto-budo che la Jerusalema Libro-Foiro (11-15.6, bv. skribi al Amri por kunordigi vian deĵortempon)
2. Ni bezonas lokajn talentojn por la arta programo de la Landa Kunveno (26.6, bv. proponi vin che Matilda au Jehoshua).
3. La Tel-Aviva klubo bezonas provizoran klubestron kaj proponojn por programoj en la datoj 19.6 kaj 3, 10, 24 kaj 31 de julio.

Felichan pentekosto-feston

Amri Wandel
Prezidanto de ELI

(עברית – hebrea)

שלום חברים,
כתבה מפורטת על סופהשבוע באשקלון הופיע
Ondo de Esperanto בירחון המכובד
(מצורפת).

בשבוע שעבר החליטה ההנהלה על מפגשי
הסופשבוע בשנתיים הקרובות: 2018 – עכו
(בסוף אפריל) ו-2019 – אילת (ראו כרזה
<http://esperanto.org.il/ik20-mona.html>)
נשלח בדואר מהיר לכל (IE 162-163) הבטאון
החברים שטרם קבלו לפני שבוע. מי שלא קיבל
אנא הודיעו לנו.

ולסיום – אנו זקוקים לעזרתכם, בשלושה נושאים:

1. בדוכן האספרנטו ביריד הספרים הבינלאומי בירושלים, ראו

<http://esperanto.org.il/foiro2017.html>
(לתאם עם עמרי)

2. הצעות לתכנית האמנותית בכינוס הארצי ב-26.6 (לתאם עם מתילדה או יהושע)

3. מועדון האספרנטו בת"א מחפש ממלא מקום. זמני לאחראי התכנית, וכן הצעות לתכנית לתאריכים 19.6, 3, 10, 24 ו-31 ביולי (לתאם עם מיכל) חג שמח, עמרי

Viva kongreso en kvar maroj

En la juda tradicio la nombro 18 havas specialan signifon, ĉar ĝia transskribo per hebreaĵ literoj signifas «vivo». Ne estas do mininde, ke la 18a Israela Kongreso, okazinta en la suda mediteranea urbo Aŝkelon de la 30a de marto ĝis la 3a de aprilo estis aparte vigla. La agrabla vetero invitis la partoprenantojn bani sin en la plaĝo apud la kongresa hotelo Leonardo, unu el la plej novaj kaj luksaj en la urbo. Dum la antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj oni havis la okazon naĝi en tri pliaj maroj: la Ruĝa, la Morta kaj la Galilea.

La partoprenantoj ricevis amason da dokumentoj kaj regaloj: ĉe la akceptejo tuj post la alveno oni ricevis la nomŝildon kaj la program-brosuron. Aldone al la detala programo kaj la listo de partoprenantoj, ĝi enhavis kompilaĵon de ĉiuj 18 Israelaj Kongresoj (kiuj ĝis 2010 nomiĝis KIES, Komuna Israela Esperanto-Semajnfino), okazintaj ĉiujare ekde 2001. Sekve oni ricevis freŝe printitan ekzempleron de la nova duobla numero de la revuo *Israela Esperantisto* kun artikoloj pri la pasintjara Israela Kongreso en Jafo, verkitaj de tri el ĝiaj eksterlandaj partoprenantoj (http://esperanto.org.il/dosieroj/IE162_3.pdf). Krome ĉiu partoprenanto ricevis turisman pakajon donace de la municipo de Aŝkelon.

Inter kvindekda partoprenantoj estis sep eksterlandanoj el Germanio, Usono, Ruslando, Latvio kaj Litovio. La artan programon gvidis la konataj bardoj Edgar (el la grupo Asorb) kaj Mikel Bronŝtejn. Koncertoj okazis en la vesperoj, kaj kantateliero posttagmeze. En la muzikaj vesperoj kantis ankaŭ la "lokaj" talentoj Soŝia, kun kantoj el sia esperanta KD Nova Tago Venis, eldonita pasintjare, Enrika, kaj – surprize! – la plej juna partoprenantino, la kvarjara Alma Vodevoz (filino de Eran) deklamis infankanton en Esperanto. Tali Wandel prezentis en ambaŭ vesperoj eŭritmajn Esperanto-dancojn, kaj dumtage ŝi ankaŭ gvidis eŭritman laborgrupon.

La matenoj estis dediĉitaj al ekskursoj. Amri ĉiĉeronis en pluraj belaj turismaj anguloj en Aŝkelon, urbo ne multe konata eĉ al israelaj partoprenantoj, pluraj el ili asertis ke tio estis ilia unua vizito al tiu urbo. Vendrede oni vizitis la "Sarkofago-parkon", kie oni eksponas belegajn gravuritajn ŝtonajn sarkofagojn el la romia epoko, kaj la apudan hejman muzeon de la mond fama mozaika artistino Ilana Safir. Sabate oni ekskursis al la Aŝkelona apudplaĝa parko, kie troviĝas la plej antikva arko de la mondo, kiu aĝas 4000 jarojn, belaj marbordaj pejzaĝoj kaj puto de la otomana epoko.

Ankaŭ la kleriga programo estis varia kaj inkluzivis du prelegojn de Bronŝtejn pri

rusaj kaj jidaj bardoj, Amri prelegis pri astrobiologio kaj pri vojaĝo al Etiopio, Gabi pri tri famaj sciencistoj.

En la tradicia ferma diskuto oni vane atendis kritikojn kaj plendojn. Estis nur laŭdoj, krom pri la kosto de la hotelo, kiu estis iom alta. Fine de la diskuto oni kolektis ideojn por la loko de la venontaj kongresoj. Por la venonta jaro estis proponita la norda parto de Israelo, ekzemple Akko. Por la postvenonta, la 20a Israela Kongreso Amri proponis Eilat ĉe la Ruĝa Maro. Intertempe la ideo evoluis kaj oni jam planas kombinitan eventon en 2019, la Israela Kongreso en Eilat kaj la Mezorienta Kongreso, kiu okazu samtempe en la Jordania najbara urbo Akaba.

Antaŭ la Kongreso, dek personoj partoprenis la kvintagan ekskurson al Jerusalemo, la Morta Maro, Masado, Eilat kaj Jordanio (Petra kaj Wadi Rum). Post la kongreso okazis tritaga ekskurso al Haifa, Akko, Nazareto, monto Tavor kaj la lago de Galileo.

Amri Wandel

(Esperanto)

Karaj geamikoj,

Detala raporto pri la chi-jara Israela Kongreso en Ashkelon aperis en La Ondo de E-o (aldone).

En la du sekvaj jaro la Israela Kongreso okazos en Akko (2018) kaj Eilat (2019, vidu la afiŝon:

<http://esperanto.org.il/ik20-mona.html>).

La bulteno (n-ro 162-163) estis dissendita antaŭ unu

(31/5/2017)



La fama kartvela epopea poemo de ŜOTA RUSTAVELI titolita "KAVALIRO EN TIGRA FELO" kaj verkita en la 12-a jc estis tre sukcese kaj lerte esperantigita de Zurab MAKAŜVILI en la 1980-aj jaroj kaj ĝi estis aperigita en libroformo pere de la eldonejo ""Sabĉota Sakartvelo" en Tbiliso en la jaro 1989.

En la jaro 2013 okazis la 7-a MONA kunveno en Tbiliso kaj la temo de la kunveno estis Ŝota Rustaveli kaj lia libro "Kavaliro en Tigra Felo". Ĉar la tradukaĵo farita de Zurab Makaŝvili tiam estis jam elĉerpita la kartvela esperantisto Nana Ĥizambareli kun sia teamo kompilis kaj redaktis ĝin kiel komputilan version kaj ĝin lingve reviziis Renato Corsetti.

Nun la libro estas senpage elŝutebla el la MONA retejo. Bonvolu klaki sur la bildo por elŝuti kaj ĝui ĝin.

Bonan legadon.

E-budo en Jerusalemo kaj inauguro de E-tabulo "Patro nia". Novaj libroj.

- Israelo

(2/6/2017)

<http://esperanto.org.il/>.

(Esperanto)



Karaj geamikoj,

En la post-venonta semajno okazos la Internacia Libro Foiro de Jerusalemo (14/6/2017), kie ELI, kiel kutime, havos Esperanto-budon. La Foiro okazos en la malnova trajna stacidomo, inter la 11-15.6. Aparte indas viziti nin merkrede, la 14.6, kiam okazos (je la 19-a) publika debato pri "Esperanto kaj la ideo de Internacia Lingvo", kun Doron Modan, Tali kaj mi. Vidu en la foira programo,

<http://www.jbookfair.com/en/#calendar>

kaj en la retejo de ELI

En la sama tago okazos (je la 16-a) la inauguro de la renovigita Esperanto-tabulo (aldona foto) en la preghejo "Patro Nia" sur la Oliva Monto. Estos tie ankaŭ eskterlandaj gastoj. Ni esperas ke vi kaptos la okazon partopreni ambau evenojn.

Okaze de la Librofoiro ELI aĉetis la novan anglalingvan libron pri Esperanto, "Bridge of Words" (vidu ekzemple

<http://www.goodreads.com/book/show/23847913-bridge-of-words>).

Estas kelkaj ekstraj ekzempleroj, por la kosto de 100 NIS.

Same ni havas kelkajn ekzemplerojn de la libro "La eta Princo" en Esperanto (60 NIS).

Pacan sabaton,
Amri Wandel
Prezidanto de ELI

(עברית – hebrea)

שלום חברים,

בשבוע שאחרי הבא יתקיים יריד הספרים הבינלאומי בירושלים. כמו בעבר נקיים ביריד דוכן



במיוחד כדאי להגיע ביום רביעי, 14.6, אז יתקיים ב-7 בערב דיון פומבי על אספרנטו בהשתתפות דורון, טלי ועמרי פרטים בתכנית היריד <http://www.jbookfair.com/#calendar> יש ללחוץ על הריבוע עם הכותרת "אספרנטו" ובאתר האגודה ("ורעיון השפה הבינלאומית (תאור מפוט של הפנל בקישור <http://esperanto.org.il/foiro2017.html>). באותו יום אחה"צ (בשעה 4) תתקיים חנוכת לוח האספרנטו המחודש (ראו תמונה מצורפת) בכנסית "אבינו שבשמיים" על הר הזיתים, במעמד אורחים מחו"ל. נשמח אם תגיעו ותשתתפו בשני הארועים.

לרגל ההשתתפות ביריד רכשה האגודה מספר עותקים של הספר החדש (באנגלית) על אספרנטו (ראו לדוגמא <http://www.goodreads.com/book/show/23847913-bridge-of-words>) כן של הנסיך הקטן באספרנטו. כמובן שגם, חברים יכולים לקנות את הספרים. מחירים 100 ש"ח לראשון ו-60 לשני. שבת שלום, עמרי

אספרנטו, בימים 11-15.6. נחוצים מתנדבים. לאיוש הדוכן (בפרט ביום ב) נא לפנות לעמרי.

INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

- Kartvelujo

საერთაშორისო ენა ესპერანტო / INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Afiŝita en 03/06/2017

(ქართული – kartvela)



საერთაშორისო ენა ესპერანტო

ძირითადი სახელმძღვანელო

ადაპტირებულია ქართულენოვანი მკითხველისათვის
ნანა ხიზამბარელის მიერ

ორიგინალური გამოცემის ავტორია ესპერანტოს
საერთაშორისო აკადემიის
აკადემიკოსი ზორის კოლკერი

(* წიგნის გადმოსაწერად დააწკაპეთ სურათზე

(3/6/2017)

(Esperanto)

INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Baza lernolibro Adaptita por kartvellingva leganto de Nana Ĥizambareli
Aŭtoro de originala eldono membro de Akademio de Esperanto BORIS KOLKER.
Bonvolu klaki sur la bildo

Lernu Esperanton La Internacian Lingvon - Kartvelujo

ისწავლეთ საერთაშორისო ენა ესპერანტო / Lernu Esperanton la Internacian lingvon

Aŭnita en 06/06/2017

(ქართული – kartvela)

ვებგვერდი <http://www.lernu.net> ამჯერად უკვე თითქმის სრულადაა ხელმისაწვდომი ქართულ ენაზე. არ გამოტოვოთ საერთაშორისო ენა ესპერანტოს სრულიად უფასოდ სწავლის ეს უნიკალური შესაძლებლობა. იგი იოლად შესწავლადი ენაა და დაგეხმარებათ მთელი მსოფლიოდან სხვადასხვა ხალხთა გაცნობასა და მათთან ურთიერთობაში. ესპერანტოში წერა-კითხვისა და საუბრისათვის საჭირო ბაზისურ დონეს მხოლოდ და მხოლოდ რამდენიმე კვირაში შეგიძლიათ მიადწიოთ.



ვებგვერდის ქართულენოვან ვერსიაზე გადასასვლელად მიჰყევით შემდეგ ბმულს: <https://lernu.net/ka>

(Esperanto)

Nun la retejo de Lernu.net estas preskaŭ kompleta en la kartvela lingvo. Ne maltrafu la ŝanĉon lerni la internacian lingvon Esperanto. Ĝi estas facile lernebla kaj helpos vin konatiĝi kaj interparoli kun homoj en la tuta mondo. Vi nun bezonas kelkajn semajnojn por atingi la nivelon por skribi kaj paroli ĝin.



Jen la ligilo al la kartvela parto de la retejo: <https://lernu.net/ka>

საერთაშორისო ენა
ესპერანტოს
შემსწავლელი
მრავალენოვანი
ვებგვერდი

ESTAS

lernu! არის მრავალენოვანი ვებგვერდი, რომელიც ინტერნეტში წარმოადგენს საერთაშორისო ენა ესპერანტოს შესახებ ინფორმაციასა და მის მარტივად და უფასოდ შესწავლას ეხმარება.

La Teorio Nakamura



(7/6/2017)

La 11-a Mezorianta Esperanto-Kunveno okazos inter la 30-a de marto 2018 ĝis la 6-a de aprilo 2018, inkluzive de postkunvenaj ekskursoj en Marakeŝo – Maroko.

En la programo estos: prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj!
Ĝenerala temo: “**Esperanto en Norda Afriko**”

Aliĝoj kaj informoj ĉe: mezorianta.kunveno@esperanto.org

Por pli da detaloj:

http://uea.org/vikio/La_dekunua_Mezorienta_Kunveno_en_Marakesho,_Maroko



(19/6/2017)

Nia komisionanino Annie Grente informas ke ŝi organizas junularan renkontigon en sia domo en Kreto:

Junulara Renkontigo de Annie Grente
Junulara renkontiĝo en Kreto

Saluton al ĉiuj, mi volas informi vin, ke mi organizos ion por homoj kiuj opinias, ke ili estas junaj...

Kiam ? De la 18-a ĝis la 28-a de aŭgusto 2017

Kie ? En Kreto, urbo Neapoli, en mia « Esperanto » domo
Kiom kostos ? 5€ tage por manĝoj (ĉar bedaŭrinde mi ne estas sufiĉe riĉa por pagi la flugbiletojn...)

La kondiĉoj (jes estas kondiĉoj...) : mi povas gastigi 10 homojn kun DEK DIVERSAJ GEPATRAJ LINGVOJ... (nu tiu estas mia celo, bonvolu helpi min sukcese!). Mi ŝatus, ke almenaŭ kelkaj estu komencintoj.

Por kontakti min : anniegrente@hotmail.fr

Dankon,

Annie — en Neápolis, Lasithi, Greece.

(Esperanto)

Karaj geamikoj,

Ĉ. 40 s-anoj partoprenis lunde la Landan kunvenon de ELI en la Tel-Aviva klubo. Amir Naor prezentis sian novan retejon <http://verkoj.com/> kaj Tali laŭtlegis la leteron de Mikaelo Bronštejn, pri sia partopreno en la Israela Kongreso ĉi-jara, akompanita de fotoj de la kongresaj ekskursoj. Tali ankaŭ prezentis eŭritmiajn dancojn. Ŝoŝia prezentis kantojn de sia nova KD "Tago Venis" kaj Enrica kantis siajn konatajn kantojn kun muzika akompano de la muzikisto Tal Babitzky. Tal, kiu profesie ludas kun sia bando kaj akompanis ankaŭ Edgar de Asorti, dum la Israela Kongreso ĉi jare, aŭdis pri Esperanto de sia avino en Litovio. Li ankaŭ akompanis la publikan kantadon de israelaj kantoj en E-traduko el la KD "Kanti gefratoj kune" kaj la kantadon de la himno en la fino, kaj ludis de siaj propraj komponaĵoj. Sekve la nuna kunveno estis plena de muziko. Venis ankaŭ kelkaj novaj personoj – inter ili Monir, palestinano el Betlehemo, kiu jam delonge interesiĝas pri E-o, kaj alia junulo kiu legis pri la kunveno en Facebook. Fotoj videblas che:

https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10213634270961007?notif_t=feedback_reaction_generic¬if_id=1498580995387331


Amike,
Amri Wandel
 Prezidanto de ELI

(עברית – hebrea)

שלום חברים,
 ביום שני נפגשנו לכנס הקיץ הארצי. היו כ-40 חברים, ותכנית מלאה כל טוב (וגם כיבוד). הרצאה של אמיר על אתר היוצרים החדש שלו, טלי קראה מכתב של מיכאל מרוסיה על ביקורו בישראל, מלווה בתמונות מהסופשבוע והטיולים שלו, וגם הציגה ריקודים אוריתמיים. שושיה שרה עם הגיטרה שלה ואנריקה בליווי המוזיקאי טל בביצקי, שנזכר שסבתא שלו סיפרה לו על אספרנטו בליטא. טל שליווה את אדגר בסופשבוע באשקלון גם ליווה הפעם את השירה המשותפת של שירים תקליטור "שירו אחים גם יחד" – שירים ישראליים באספרנטו ואף את שירת ההימנון בסוף. כמו כן ניגן מספר יצירות שהלחין בעצמו. הגיעו כמה צעירים חדשים, ביניהם מוניר מבית לחם שכבר מזמן מתעניין באספרנטו. תמונות באתר

https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10213634270961007?notif_t=feedback_reaction_generic¬if_id=1498580995387331





الاسبرانتو في الأردن
الاسبرانتو... اللّغة العالمية
إنّ الحضارات في الألفيّة الثالثة بحاجة إلى التعاون لا التّصارع، لغة الاسبرانتو العالمية لغة من أجل التّعاون
وألّسلام، إنّها لغة لا تنتمي لأحد إنّها للجميع وهي سهلة وليس فيها أيّ تفضيل لأحد دون الآخر
لكي تتعلمها، زُر صفحة الفيسبوك "الاسبرانتو في الأردن"
<https://esperanto-arab.jimdo.com>

Esperanto, la internacia lingvo

En la tria jarmilo civilizoj bezonas kunlabori kaj ne interbatali. La internacia lingvo Esperanto estas la lingvo por kunlaboro kaj paco. Ĝi estas lingvo, kiu apartenas al neniu kaj al ĉiu, facile lernebla kaj donanta avantaĝojn al neniu. Por lerni ĝin simple iru al la paĝo [الاسبرانتو في الأردن](https://esperanto-arab.jimdo.com).

ESPERANTO ARAB



الإسبرانتو في الدول العربية

<https://esperanto-arab.jimdo.com/>

إن أردت الحصول على معرفة أولية بالاسبرانتو، انقر هنا
<http://www.kurso.com.br/index.php?ar>

إن أردت منهجاً مكتملاً، اضغط هنا
<http://ar.lernu.net/>

إن أردت استلام نصوص الكتب التعليمية عن الاسبرانتو بالعربية، ارسل رسالةً إلى هذا العنوان
<duurus-al-lughati-ad-dualyti-al-esperanto-subscribe@yahoo.com>

إن أردت اتباع منهج الاسبرانتو بالانجليزية، انقر هنا
<https://en.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

إن اردت استلام مواد تعليمية مطبوعة، ارسل بريدك الالكتروني إلى
komisiono.MONA@gmail.com.

استمتع وأنت تتعلم أسهل لغة في العالم!